Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org/
marto - aprilo 2011, n-ro 3 -4 ( 1269 - 1270 )

# Sennaciulo

## Nia dosiero -
## Emeritoj kaj pensioj, kial rilati al maljunuloj



**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!**

# Mortis saĝa viro



Maloftas blankaj meroloj. Maloftas vere saĝaj homoj. Mortis nia kamarado kaj karega amiko Gerardo Lieblang. Li estis la blanka merlo, li estis la saĝa homo.

Ĉiam bonhumora, tamen iom silentema, li aŭskultis al homoj kaj kiam li parolis, li uzis saĝajn vortojn. Vundi homojn estis al li fremda, por tio li ege respektis homojn kaj iliajn ideojn.

Dum jaroj li luktis por la rajtoj kaj la bono de homoj kiuj havas handikapon, al kiuj la vivo ne estis tiel favora ol devas esti. Preskaŭ pasie Gerardo parolis pri la asocio pri handikapuloj en kiu li kunagadis. Li donis eblon al la asocio prezenti sin kaj siajn agadojn dum SAT kongreso, kiu okazis en la jaro 2007 en Antoni, proksima al la lumurbo Parizo. Poste li petis kelkajn paĝojn en la revuo de Sennacieca Asocio Tutmonda por havi dosieron kiu traktas la rajtojn de handikapuloj. Pli, li intencis denove trakti la problemaron de handikapuloj en nova dosiero.

Li kreis forumon en kiu homoj povis paroli pri handikapaj situacioj kaj problemoj. Lia granda forto estis ke li kapablis ligi diversajn socialajn ecojn al unu granda unuo. La homoj, la socio en kiu ni devas kune vivi. Sen juĝi homojn, sed per respekto por aliaj.

Tiel Gerardo estis. Li ne bezonis fanfaroni pri si mem. Modesteco estis lia plej favora maniero prezenti sin. Tamen li posedis la klerecon kaj inteligentecon por diskuti kun homoj de ĉiu sociaj tavoloj, ĉu riĉa, ĉu malriĉa, ĉu klera aŭ malklera. Homo estas homo por Gerardo kaj li alproksimiĝis ĉiun kun la sama respekto.

Ni povas havi nur bonajn memorojn al tiu kara amiko. Kiel li metis fotojn en interretan paĝaron de Ipernity por montri ke printempo venis en Parizo. Aŭ li metis ideojn en tiu paĝaro de Ipernity, ideoj kiuj de tempo provokis debatojn kiujn li partoprenis kun mildeco al li kutima.

Kiam oni havas la aĝon de Gerardo jam malaperas la unuaj amikoj pro morto kaj ĉiam kiam mortas amiko, ni haltas momenton kaj konstatas ke ni ne prenis sufiĉe da atento pri tiu persono. Ni ĉiuj okupiĝas tro pri nia propra NI kaj ne sufiĉe pri ni ĉiuj.

Ni adiaŭas hodiaŭ homon kiu estis riĉa laŭ meritoj. Maloftas blankaj merloj, maloftas bonuloj kiel nia amiko Gerardo Lieblang. Ni tenu lin en niaj memoroj. Ne nur lin sed ankaŭ lian bonecon por aliaj homoj, lian respekton por homo kaj naturo.

Ni perdis bonan amikon. Estas kun ĉagreno en koro kiel ni devas adiaŭi lin.

Kun plej granda respekto ni salutas vin, Gerardo. Havu trankvilon kiun vi meritas.

Por Sennacieca Asocio Tutmonda, liaj k-doj de la Plenum-Komitato

# Enhavo


Mortis saĝa viro 2

Miaj travivaĵoj 4

-2030 - insurekcio de la maljunuloj 6

Maljunuloj el ĉiuj landoj 7

Mi jam pagis mian kotizon por SAT! 8

La emerito 9

Maljunuloj kaj dependenco 10

Maljunuloj en institucioj totalismaj 11

Dua projekto de INTERKANT' 14

Intrigo-resumo 15

Karmen' – La lokoj, la teritorio de pasio

– dua parto 15

La limoj de toleremo 17

La kapitalismo formortis 18

La katastrofa dujara regado de Obama 20

Falsa proceso, reala risko 23

Laboristoj mortis 25

Informo de "Internacia Handikapo" 27

En pensoj la 'revolucio' en arabaj landoj. 27

Raporto pri kunsido de la komunista frakcio

en Braŝovo (aŭgusto 2010) 28

Gesto 35

La vojo de la poezio 35

Granda paruo 36



## Sennaciulo
## Oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1 47 97 71 90
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.;
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Franjo Leveque-Provost
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent,Thérèse Sabatier

Redaktantoj - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, David Kelso, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale. Enpaĝigas Jakvo.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567




### Donacoj ek de 1-a de Februaro

Hammerberg - Svedio: 21.91 €

Dumviva Kotizo de Yamamoto Sintaro 200 000 jenoj (1830 €)

Fujikawa Junko - Japanio: 700 JENOJ 6 €, 40

Huzimaki Ken'iti - Japanio: 350 JENOJ 3 €, 20

Tezuka Toŝio - Japanio: 2850 JENOJ 26 €

Unoki Takanori - Japanio: 700 JENOJ 6€,40

Noordewier- Nederlando NL 457 €.

# Miaj travivaĵoj

Jen miaj personaj travivaĵoj rilate al maljuniĝo. Mia patrinflanka avino en Britio loĝis sola en sia familia domo, ĝis kiam ŝi agnoskis ne plu esti kapabla aŭ dezira prizorgi la domon kaj la ĝardeneton. Mia onklo, kiu bonŝance al li sed malprofite al miloj da proletoj en Britio sufiĉe riĉiĝis por aĉeti bienon, proponis al ŝi translokiĝi ĉe sin. Li posedas kasteleton, kaj en unu el la apudkonstruaĵoj, li aranĝis etetan loĝejon. Tie mia avino pasigis siajn lastajn tagojn, ĝuante la ĉeeston de la filo kaj de la floroj kaj ĝardeno, kiun ŝi nur profitis kaj ne plu devis prizorgi. Kompreneble, tio certe influis sur la vivon de mia onklo kaj de ties kunulino, ĉar ne ĉiam estas facile vekiĝi matene kaj vivi sub la rigardo ama sed kritik-kapabla de la patrino. Pri tiu travivaĵo mi ne povas diri pli, ĉar de tiam mi ne havis okazon paroli kun la onklo.

Ĉe la patra flanko, miaj geavoj loĝis kune en sia domo, ĝis kiam mia avo mortis en la brakoj de mia avino. Nun, ŝi loĝas sola en la domo, kaj la gefiloj organiziĝas por viziti ŝin ĉiun semajnon (kio estas ne malgranda sindevontigo, la kilometroj estas multaj inter diversaj loĝejoj). Ŝi kviete maljuniĝas, mense kaj korpe iom post iom kripliĝas, sed ŝi restas en sia vivloko kaj ne deziras translokiĝi: ŝi perdus ĉiujn referencojn, sian tutan etan socian vivon, kaj malfeliĉiĝus. Mi ne diras ke ŝi estas nun feliĉa, tio ne eblas; ŝi perdis sian lastan filinon pro aŭtomobil-akcidento kiam tiu ĉi estis 14-jaraĝa, kaj nun ŝi vivas sole, sen havi la edzon, kiu ĉion regis en la domo. Tamen, ŝi daŭrigas sian vivon, sen espero, sen kompreni kion faras la genepoj - ŝi estas tiel for de iliaj vivproblemoj! - sed ŝi daŭrigas sian vivon en sia ĉiutaga ĉirkaŭaĵo. Kaj ĉi tion ebligas la ekzisto de subvenciata asocio landskala (en Francio) nomata Asocio por Ĉehejma Helpo en Kampara Medio (France: ADMR). Ĝi disponigas homojn (minimume pagatajn, laborantajn en malfacilaj kondiĉoj, des pli ke la ŝtataj subvencioj malkreskegas, kio kreas devojiĝon de la unua celo sociala al pli rentodona celo...) por ĉu kunporti unu fojon tage manĝaĵojn, ĉu por purigi la domon, ĉu por helpi la personon ellitiĝi, ĉu por kuiri manĝaĵon kaj manĝigi la helpaton. Mia avino akceptas du servojn, kiuj estas kunporto de manĝo kaj purigado de la domo (plus iom da homa ĉeesto, kio ne malplej gravas). Tio ĉi eblas, ankaŭ ĉar miaj gepatroj kaj geonkloj povas elpoŝigi iomete da mono por kompletigi la hornombron atribuitan al mia avino de la helpservoj de la distrikto.

Mi persone havas alitipan travivaĵon, kaj mi profitas la okazon por dediĉi ĉi tekston al Iren', kiu nun kuŝas en hospitalo por provi elkaĉiĝi el severa bronkito. Irenon mi ekkonis kiam pro personaj kialoj okazis ke mi loĝis ĉe najbaroj de ŝi. Mi multe ŝatis interparoli kun ŝi, ĉar renkonti kamparaninon, kiu tiom malmulte vojaĝis kiom ŝi, kaj tamen estas tiel mens-aperta kiel ŝi, estas esceptaĵo. Imagu, eĉ la fremdulojn ŝi ŝatas! Poste, okazis ke ŝia malsano (artrozo) plu progresis ĝis igi ŝin ne plu kapabla paŝi kaj prizorgi sin mem. La najbaroj persvadis ŝin, ke ŝi venigu flegistinojn por ŝiaj higienaj bezonoj kaj help-dommastrinojn (de la supre menciita asocio) por la ĉiutagaj taskoj. Tio daŭris kelkajn monatojn, kaj Sandrin' (kunulino mia) estis unu el tiuj helpdommastrinoj, tiel ili ekinteramikiĝis. Kaj iom post iom progresis la ideo, ke Iren' posedas loĝejon kaj kultureblajn terojn sed bezonas homan kuneston, kaj Sandrin' kaj mi povis proponi tiun homan varmon kaj bezonis teron kaj loĝejon. La ideo progresis en la kapoj ĝis la momento en kiu Iren' devis urĝe iri hospitalen, kaj revene bezonis ne nur homan korvarmon sed ankaŭ konstantan atenton (ŝi ankoraŭ tre malbone fartis). Tiam ni haste translokiĝis al ŝia domo, kie ni nun loĝas. Mi ne volas priskribi kiel mi imagas la estonton, nur povas diri ke mi min devontigis antaŭ Iren', ke se iam - pro iu ajn kialo - mi devus forlasi la domon kaj ŝin, mi prizorgus kune kun ŝi, ke ŝi ne restu en soleco aŭ perditeco. Tio probable signifus, ke mi devus trovi lokon por ŝi en iu maljunulejo, kiu iĝus ŝia tombo, ĉar sendube ŝi rezistos malmultan tempon al elradikigo el sia domo. Sed ŝi diris ke ĉiukaze neniam ŝi denove provus tian eksperimenton kun aliulo.

Nun mi deziras ĵeti sur la paperon kelkajn analizpunktojn aŭ rimarkojn, kiuj eble povus interesi la leganton. La unua rimarkindaĵo estas, ke nia klopodo organiziĝi por trovi tian interŝanĝon estas laŭ mia kompreno pri la situacio en Francio sufiĉe malofta, eĉ eksternorma. Kaj se io estas eksternorma, tio havas en Francio plurajn sekvojn: neniun subtenon de la ŝtat-instancoj (ekzistas mizera financa helpeto por la familiaj helpantoj, sed ne por la eksterfamiliaj... do la tempo kiun mi pasigas kun Iren' estas konkrete forprenita de mia persona tempo, kiun mi povus dediĉi al laboro, kio ebligus al mi akiri eble iom pli rapide la pensiiĝon), misfidon de la najbaroj (kiuj estas tiuj fremduloj, kion ili volas, ĉu ili estas frenezaj aŭ ŝtelemaj?), admiron de kelkaj amikoj ("Vi ja estas kuraĝaj", kio en la malfacilaj momentoj sentigas min sole...), nekomprenon de bona parto de la socio, kaj finfine ne estas veraj leĝaj kadroj